Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 16-an de marto 2023 per Teams

Ĉeestis
Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo
Ni aprobis la tagordon aldonante novan punkton sub Eventualaĵoj.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 25-an de januaro 2023
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis kun du ŝanĝoj.

3. Esperantonia
Ni proponas al la Oslo-klubo altigi ilian parton de la kostoj de 15.200 al 20.000 kronoj.

4. Jarraporto 2022
Ni petu al Douglas difini laŭ adresoj, kiuj membroj estas membroj de kiuj kluboj.

5. Jarkalkulo 2022
Claude informis pri la jarkalkulo kaj la revizia raporto.

6. Landa kunveno 2023
Ni pretigas la jarraporton kaj jarkalkulon. Bo Clausen faros etan koncerton dum la landa kunveno.

7. StatutŝanĝojN
La estraro proponos al la landa kunveno ses statutŝanĝojn.

8. Novaj membroj – rutinoj por membrolisto
Claude prizorgas la membroregistron. Bård verkos bonvenigan leteron al novaj membroj.

9. Telefono en Esperantonia
La oficejo havos novan telefonnumeron pro transiro al poŝtelefono. Ni memoru informi pri tio al ĉiuj, kiuj ĝin bezonas.

10. Kvanto de Norvega Esperantisto – ĉu redukti oficiale?
Ni decidis redukti la aperadon al kvar numeroj jare kaj diskuti la demandon dum la landa kunveno.

11. Tombo de Haldor Midthus
Ni pagas por la tomboŝtono en 2023 kaj pludiskutos ĝian sorton.

12. Membriĝo en FN-sambandet
Ni decidis ne membri en la asocio en 2023, sed eventuale remembriĝos se aperos aktivemuloj.

13. Porkomencanta kurso
La kurso, kiu okazas rete, komenciĝis la 15-an de marto kun kvar partoprenantoj.

14. La heredaĵo de Esther Olsen
La domo de Esther Olsen estas vendita.

15. Eventualaĵoj
La estraro rajtigas al la kasisto nome de NEL elpreni el Skagen-fondene ĝis 10.000 kronoj en ĉiu kalendara jaro sen aparta estrara decido.

16. Venonta estrara interkonsiliĝo
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 27-an de aprilo je la 20-a horo.

Protokolis Marianne Lund